

26-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj:

PALMELA

Biblioteca de Pinhal Novo, 5-a ĝis 7-a de oktobro 2012

Nia 26-a jara renkontiĝo okazos la unuan semajnfino de oktobro 2012 en la ĉarma sud-lisbonia kastelurbeto Palmelo. Aniĝu ĉe <http://esperanto.pt/rpe026/> kaj legu la programon el p.ĝ.3

REMETENTE:

Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-r/c A

PT-1500-239 LISBOA

PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio anúmero	últ. quota paga lasta kotizpago	foto
------------------------	------------------------------------	------

laste ricevita interŝanĝnumero
(abonantoj kaj aldonatatoj ignoru)

ISSN:0871-9241

NiaBulteno

ABRIL-JUNHO 2012 APRILIO-JUNIO • Numero 94

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-ªA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • asocio@esperanto.pt • www.esperanto.pt

28-a Printempa Semajno Internacia (Germanio):



Bonnan Paskon!

La lemantaro de Luís LADEIRA bravas ĉijare al "normala" esperanto-aranĝo, la fama PSI:
Jen surfote deko da 15/16-jaruloj el la nune sola esperanto-kurso en lernejo nia-landa. P.ĝ.4

Ĉefurbe prestiĝaj prezentiĝoj

Tre baldaŭ du gravaj publikaj eventoj pri esperanto: En Lisbono magistriĝa diserto kaj en Madrido lingvrajta prelego. P.ĝ.3,9

En esperanto-insulo

Geparo Boieiro raportas pri internacia esperanto-kursaro okazinta en Hajnano. P.ĝ.5

Traduko postulata el São Bento!

Niajn politikistojn agacas la trudangla: P.ĝ.8

26-a R.P.E.: Palmelen!

Jam ekpretas bunta programo kaj certas tre bonaj kondiĉoj por nia landa renkontiĝo oktobre: Mankas nur *via* aniĝo! P.ĝ.3,12

Eduardo NOVEMBRO laŭreat' en Vjetnamio!

Honoran mencion en la *Belartaj Konkursoj* de U.E.A. gajnis portugalo EdNov per la teatraĵo "Fetorafero"; legu elsur p.ĝ.8

Neutrális facilisque: La 16 regulojn latinlingve

p.ĝ.6-7

Nia Bulteno (informa bulteno de Portugala Esperanto-Asocio)
 N-ro 94 (2012.04-06) ISSN:0871-9241
 Redaktis: A. MARTINS-Tuválkin
 Reviziis: A. S. ALMEIDA
 Eldonkvanto: 270 ekzempleroj
 Abono (4 n-roj/j., nur ekster PT):
 ½ de via landa M.A. de U.E.A.
Unuopa ekz. (91-94): 5,00 €
 Rete: <http://www.esperanto.pt/dok/nb094.pdf>
Finkompostita en: 2012.09.09
Limdato por NB95: 2012.10.15
Kontakto: <bulteno@esperanto.pt>



(pessoa coletiva de utilidade pública)

☉ sabate 15:00-19:00; sideje
 ✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
 PT-1500-239 LISBOA
 ☎ +351 217 141 359 ☎
 ☎ +351 261 988 181
 ✉ <info@esperanto.pt> (português)
 ✉ <asocio@esperanto.pt> (esperante)
 ☎ <http://www.esperanto.pt/>
 ☎ <pea_diskut@googlegroups.com>
 ☎ <http://www.facebook.com/pages/Portugala-Esperanto-Asocio/142303665812941>

CAE: 91331 NIF: 501 547 312
 Fondita en 1972.04.25
 Landasocio de U.E.A. ekde 1979
 Kom.-Obs.: Faria de Bastos
 Membroj: 58(+104) en 2012.09.08
 Monata kotizo: 3,00 €
 (emeritoj kaj sub-18-jaruloj:
 2,00 €, nepagpovaj: 0,00 €)
 Anĝkoto: 5,00 €
 Pagojn al bankkonto:
 (BIC: CGDIPTPL) IBAN: PT50
 0035 0640 00 025 961 430 49 aŭ
 NIB: 0035 0640 00 025 961 430 49

GVIDORGANOJ: (ekde 2011.03.26)
General-Asemblea Stabo:
 <assembleo@esperanto.pt>

Prezidanto: Alexandra PAZ
Sekretarioj: Rui Q. VALÉRIO
 FRANCISCO MELO

Estraro: <estraro@esperanto.pt>
Prezidanto: José MARTINS
Vicprezidanto: Wilson BRÍGIDO
Sekretario: <sekretario@esperanto.pt>
 IURI GASPÁR
Kasisto: <kasisto@esperanto.pt>
 VÍTOR MARQUES

Voĉdonantoj: Luís OLIVEIRA
 A. MARTINS-Tuválkin
 NUNO MAGALHÃES

Al si rigardi, pri si okupiĝi, kaj sin studi, analizi, diskuti, korniki — jen “peko”: Ja nia movado celu la estonton, ja la organizoj servu nur tiun celon kaj do malindu je atento... Iom kulpente nia asocio tamen pekadas: Neniam mankis en niaj paĝoj kaj programoj eroj pri movadhistorio, kaj fine 2012 ekvidis akademian, profesian atenton al ĝi (NB92:9). Inter la postlasaĵoj de Franco SIMÕES (mem parto de nia historio) mi trovis la mitajn 16 regulojn de nia lingvo verŝitajn en la latinan far la tiama novulo Gonçalo NEVES, kiujn la kara inĝeniero gardis — certe por iama, estontcela uzo. Jen ili aperas ĉinumere i.a. ĝuindaĵoj, kelkaj eĉ pekecaj. **Red.**

Kontrol-Komitato: <kk@esperanto.pt>

Rezidanto: A. da Silva ALMEIDA

Revizoroj: Alcino ALVES
 Miguel BOEIRO

NEBALOTITAJ POSTENOJ:

Lernado: <lernado@esperanto.pt>

Nádia PENAS; Iuri GASPÁR

Libro-Servo: <vendejo@esperanto.pt>

Rui Q. VALÉRIO

Biblioteko: <biblioteko@esperanto.pt>

Wilson BRÍGIDO

(periodaĵoj) Wilson BRÍGIDO

(eltondajoj) MARTINS-Tuválkin

(diversaĵoj) (vakas)

(fotarkivo) A. S. ALMEIDA

Gazetaro: <imprensa@esperanto.pt>

(vakas)

Eldonoj: <eldonoj@esperanto.pt>

A. MARTINS-Tuválkin

Subvencioj: (vakas)

Ekspozicioj: (vakas)

Komputservo: <admin@esperanto.pt>

NUNO MAGALHÃES; LUÍS OLIVEIRA; A. MARTINS-Tuválkin

Sidejmastrumo: Pedrosa ALVES

Poŝtmarkoj: Armando CARDOSO

HONORAJ MEMBROJ:

Antônio da Silva ALMEIDA

Olga Serra Marques de ALMEIDA ☐

Manuel de FREITAS ☐

Alsácia Fontes MACHADO ☐

Alberto Pedro da SILVA ☐

Adelino Franco SIMÕES ☐

Manuel Maria Sousa TEIXEIRA ☐

JUNULARA SEKCIO:

Portugala Esperanto-Junularo

Jovens Esperantistas de Portugal

Fond.: 1993 **Membr.**: 10

(L.S. de TEJO ekde 1996)

☎ <http://www.esperanto.pt/pej.htm>

✉ <pej@esperanto.pt>

☎✉ ĉe P.E.A.

LOKAJ SEKCIOJ:

PLUS — Portugala Loka Unua Sekcio (nordokc. sekcio; neag.)

Repr.: Nuno MAGALHÃES

Fond.: 2002 **Membr.:** 20

☉ Kafejo “O Pioŭho”, Leonplaco,
 Oporto (antaŭavertul)
 ✉ Rua Paulo da Gama, 550-12º A
 PT-4150-589 PORTO

✉ <plus@esperanto.pt>

☎ <http://www.esperanto.pt/plus.htm>

ALIAJ LANDAJ ORGANIZOJ:

Regiona Esp.-Asocio (Ourém)

☎✉✉✉: (anoncotaj; NB90:4)

Saluton! — Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza

✉✉ Avenida Bissaia Barreto, 2
 PT-3360-191 PENACOVA

LANDAJ REPRESENTANTOJ:

U.E.A.: Manuel PINGUINHA

TEJO: (vakas)

E.E.U.: Luís LADEIRA; José MARTINS

ILERA: Francisco MELO (TI(G)E)

EJA: Faria de BASTOS

SAT: Pedrosa ALVES (kotizp.)

IKEK: Alcino ALVES

NUMEROJ KAJ REFERENCIOJ

Ekz.: «NB12:3-4» indikas pĝ. 3 ĝis 4 de Nia Bulteno n-ro 12. Aliaj: Bb (Bubo); IL (Informa Letero); ELV (Esperanto — Lingua Viva); NS (Nia Stelo); LK (La Karavelo); RPE (Revista Portuguesa de Esperanto); SI (Saudação Informilo).

Sgnf. de logotipo kun numero:

♣1234/567 aŭ ♣1234: asociano;

♣12.345: Libro-Serva varkodo;

bibl.: ♣♠1234 aŭ ♣♠A123: libro

k.s.; ♣123: periodaĵo; **albumoj:**

♣♠1234: foto; ♣♠1234: eltondaĵo.

mo igis ankoraŭ pli urĝa la bezono de universala lingvo.

Jen elĝermis el la homara anonimeco pola kuracisto, kiu tutanime sin dediĉis al tiu grandioza entreprenado.

Neniu el la plej parolataj lingvoj taŭgis, ĝuste ĉar tio rompus tiamaniere la sendependon de iuj popoloj rilate al tiuj, kies lingvo estus elektita: la francoj ne akceptus la anglan, la hispanoj rifuzus kaj la francan kaj la anglan, la portugaloj akceptus nenium alian.

Oni pensis pri la latina lingvo, sed la demando iĝus ankoraŭ pli grava, ĉar tio signifus la hegemonion de la kristana eklezio super la ceteraj, tiel kreonte neeviteblan konflikton de religioj; krome temus pri mortinta lingvo, kiu ne plu entenis novajn vortojn de antaŭ jarcentoj, kiel okazas pri ĉiuj terminoj rilatantaj al informadiko, astrofiziko, transportaj rimedoj kaj multaj kaj multaj pliaj.

Zamenhof elpensis solvon por kreado de artefarita lingvo, kiu fariĝus la dua en ĉiuj landoj de l'mondo. Temus pri lingvo sendependa de ŝtato, entenanta regulojn kaj vortojn elprenitajn el ĉiuj lingvoj de la tero (el la angla, portugala, franca, hispana, itala, germana, ktp.), kvankam surbaze de la latina. Li simpligis eksterordinare ĉiujn gramatikajn regulojn por igi ilin facile kompreneblaj de ĉiuj homoj, eĉ de tiuj de pli malalta kulturo.

Bedaŭrinde Zamenhof ne antaŭvidis opozicion — fakte tute ne ekzistanta ĉe mondaj popolanoj — el inter la registaroj, tiel baritaj ekzerci cenzuron, ĉar iu ajn homo tra la mondo kapblas transdoni siajn konojn kaj ideojn al iu ajn alia de iu ajn lando en la tero, pere de tiu universala lingvo. Oni

estigis la plej absurdajn pravaĉojn por malhelpi ĝian disvastigadon. Ekzemple en Portugalio la diktatoro Salazar ĝin malpermesis, ĉar, laŭ li, temis pri komunisma lingvo, dum la sovetia diktatoro Stalin nomis ĝin kapitalisma. Laŭdebla nur Franco en Hispanio, kiu ne malpermesis esperanton.

Sed la katolika eklezio adoptis ĝin kiel unu el la lingvoj por proklami siajn mesaĝojn *urbi et orbi* (♣). Plie la papo Johano Paŭlo II studis kaj konis esperanton, kaj Radio Vatikano elsendas semajnan programon en ĉi tiu lingvo.

Nuntempe tre multaj homoj en ĉiuj landoj de la mondo jam konas kaj parolas esperanton, sekve jam ankaŭ eblas legi revuojn en Esperanto pri ĉieaj okazaĵoj, senbezoni povoscii lokajn lingvojn. Same pere de jam internacie ekzistantaj libroj en Esperanto, kiel ekzemple ĉe nia Akademio, la poemaro *Meridianos / Meridianoj* de d-ro Henrique MADEIRA, kaj *Etaj Rakontoj* de nia instruisto, samideano Crispim.

Estas domaĝe, ke pro malhelpo de estraroj ĝi ne estu monde diskonigata por ke ĉiuj povu ĝin paroli kaj sekve kompreni unuj la aliajn, ekzemple okaze de ekskursoj ĉu al Rusio aŭ Kanado, ĉu al Indonezio aŭ Ĉinio, ĉu al Peruo aŭ Anglio, ĉu ien ajn.

Sed tiu bezono estas tiom granda kaj tiom evidenta, ke mi hodiaŭe ne plu dubas, ke ĝi fariĝos homara estonto por ke ĉiuj pli bone rekte komprenu unuj la aliajn, kvankam bedaŭrinde tio ne okazos dum mia generacio.

Sed nia kontribuado povos transformi ĝin je grava helpo por atingi tiun celon kiel eble plej frue. ■

(♣) Latinlingve: «Al la urbo »(Romo)« kaj al la mondo».

HOMOJ / ASOCIO:

Alĵustrelo perdas la “pokalon”

Forpasis en 2006 veterano **António Vilhena Gil** (★0124), nelonge post lia multjara amiko **António da Silva** (★0297), same esperantisto kaj asociano. Ambaŭ alĵustrelanoj (*), ili estas spuroj el la loka agado de la fama hindportugala verkisto Adeodato BARRETO, kvar jarojn notario tie, kaj de samurbetano Francisco RASQUINHO, tre aktiva en la antaŭasocia epoko. (Ĉi-lasta ankaŭ rolis en la konatigo de esperanto al Agostinho da SILVA: *ELV*9:4-5.)

Tiuj du konsistigis la plej densan esperantistaron en iu ajn portugalia municipo — ja du homoj el la tieaj 10 567. Tiu rekordo validis almenaŭ sep jarojn (ekde kiam P.E.A. komencis tion statistikumi) ĝis ĵus, kiam, post familia sciigo, ili forfalis el la membrara listo.

Nune, konsiderante ankaŭ la dumman publikigon de la 2011-a censo, la plej dense esperantista portugalia municipo estas Alkoŝeto, la sola super 0,01% ($\frac{2}{17\ 569}$), kaj tute sekve la najbara Barejro ($\frac{7}{88\ 873}$) (*). Eĉ supere vicas kvin aliaj municipoj (*Castanheira de Pera, Mora, Oleiros, Madalena, Almodôvar*), sed kun po unu asociano, kio dampas la statistikan konsiderindon (**). **AMT**

(*) De la transtaĵeja minurbeto Alĵustrelo (*Alĵustrel*).

(*) Pezumo de tiu frakcio laŭ landa demografia graveco donas pli akuratan bildon pri municipa denseco de asocianoj kaj vicigas Lisbonon unue, kun $\frac{38}{547\ 631} \times 5,2\%$ — sekvas eĉ sep lisboniaj municipoj. Oporto, sociologie komparebla al la ĉefurbo, malpli ol dekonas, kun $\frac{3}{237\ 584} \times 2,3\%$ — jen tamen la ĝustigenda malsimetrio.

(*) Pli detala statistika analizado verŝajne vanas pro troa “grajneco”: Ja P.E.A. havas siajn 161 anojn nur en 53 el 308 municipoj; nemirinde la menciita pezumo redonas nur dek malsamajn valorojn (inkl. la nulon).

KRONIKO:

Esperanto — laŭ mia vidpunkto

■ **Porfírio RAMOS** (*)

Laŭpete de la estraro de Akademio Saluton (NB91:25), *verkis por ties jarlibro impresojn pri sia lernfako ankaŭ unu el la tieaj lernantoj de esperanto:*

Ke iu, kiu debutas pri la lernado de Esperanto, ekpredikas pri la afero, jen ŝajnas (kaj ja estas) netolerebla aŭdacaĵo. Sed eble tio fariĝos prajmo por tiutema diskuto, allogante ankaŭ aliajn al debato kaj (ĉefe) al ekstudo.

Okaze de la konstruado de Babelturo — tio ĉi por la biblikedantoj — oni deziris ĝin la plej alta en la mondo, alta por skrapo la ĉielon; sed ĉar tiucele vera amaso da laboristoj estus dungenda, iuj venantaj eĉ de forfore, kaj do parolantaj aliajn diversajn lingvojn, estiĝis tiel supermezura konfuzo, kiu malebligis tutfini la monumenton. Tiam la unuan fojon videbliĝis la neceso de universala lingvo por ke ĉiuj homoj povu kompreni la aliajn.

Sekve de tiutempa politika disvolviĝo kaj de la romimperio ekspansio altrudante la latinan lingvon, la problemo eĉ ŝajnis solvita; tamen, post la disfalo de tiu imperio, kaj pli malfrue pro la portugaliaj kaj hispanaj novlandaj malkovroj, ekaperis nekonitaj lingvoj apartenantaj al tieaj popoloj. Plej freŝdate la globaligo de komerco kaj turismo, la interpopola kompreno

* Ĉi teksto celas neesperantistan publikon — varbcele kurselektontojn la sekvan jaron, laŭ tono de la menciita jarlibro. El la portugala tradukis Eduardo CRISPIM, mem instruisto de la verkinto; iom kurtigita. **Red.**

ARANĜOJ:

26-a R.P.E.: Programo

Danke al la subteno de la urbestro de Palmela, ebligita per unua kontakto flanke de Miguel BOEIRO, nia 26-a renkontiĝo okazos ĉirkaŭ tiu sudlisbonia urbeto: La enĉambrajn programerojn gastigos la Palmela Municipa Biblioteko en la apuda fervojurbeto *Pinhal Novo* (Novpinaro) ok kilometrojn norde.

Vendredo, la 5-an de oktobro, 2012

(libera tago; programeroj anoncotaj)

Sabato, la 6-an de oktobro, 2012

09:00 Ariĝo ĉe *Biblioteca Municipal de Pinhal Novo*

09:30 Vizito al ekspozicio pri esperanto (bibl. halo)

10:00 Solena inaŭguro (bibl. aŭlo)

10:20 Prelego (anoncota)

11:00 Prezentoj fare de la baznivelaj sidejkursanoj

12:45 Komuna tagmanĝo (restoracio *O Telheiro*)

15:00 Prelego de José Manuel MARTINS (prof. Univ. Aveiro) pri daŭriva kultivo. Sekvas kolokvo.

16:45 Surscenigo de *Fetorafero* (pĝ.8)

18:00 Filmo (anoncota) kun esperanta traduko

19:00 Disiro tagmanĝen

Dimanĉo, la 7-an de oktobro, 2012

09:30 Paŝpromeno tra la historia urbetcentro kaj kastelo kun esperantlingva interpretado

12:45 Tagmanĝo kaj solena fermo (rest. *Retiro Azul*)

Aktualigitajn detalojn pri la programo, gastigeblecoj, kunveturado, kaj ĉeestontaro — eksciigu kaj dissciigu prefere pere de la retroŝta forumo *pea_diskut* kaŭ de *Facebook*: <http://www.facebook.com/events/426991204011259/>. Alternative, telefonu sidejen: 217 141 359. **AMT**

HOMOJ:

Resanas Pedrosa Alves!

Enhospitaliĝis la 13-an de julio la konata veterana esperantisto Manuel Pedrosa ALVES, pro traŭmato kaŭzita de hejma falo (postkontuza amnezio malhelpas pri detaloj). Post unu semajno, dum kiu ne velkis lia bona humoro, li estis jam ree hejme. Vasta amikaro deziras rapidan senspuran resaniĝon. **Red.**

ARANĜOJ:

Kien poste?

Laŭ decido de la estraro, konsiderinte kiel kelkaj el niaj ĵusaj aranĝoj (R.P.E.'25, IRO'9, Zf2012) tromodestis pro manko de lokinstanca subteno, la **Renkontiĝoj de Portugalaj Esperantistoj** (ĉ. okt. ĉiujare) k.a. asociaj aranĝoj okazu tie, kie la loka municipestraro volonte nin helpos per provizo de servoj kaj ejoj. Tiucele sendiĝis petpropo al ĉiuj landaj kulturkabenoj kaj respondoj atendatas. **AMT+IFG**

APLIKADO:

MalTEDe

Inter la dekkvar prelegoj de *TEDx*-konferenco en Madrido (sept.15) vicos esperantlingva prezento de David de UGARTE pri indiĝenaj lingvaj rajtoj. Kun la devizo «ideoj disigindaj», *TED* (origine pri teĥnologio, spektaklo, fasonigo), estas prestiĝa kadro por «ĉio avangarda kaj progresiga». Jam uzata en tradukoj de prelegfilmoj, nun nia lingvo debutos podie. David, teĥnologo, prelegos «en esperanto kaj pri esperanto kiel lingva liberprogramaro!» **AMT**

ARANĜOJ:

Eĉ dek portugalaĵoj en PSI'28

■ **Luís LADEIRA** (*)

Grupo de dek gelernantoj kaj du geinstruistoj el mezlernejo *Braamcamp Freire* (en *Pontinha*, najbare al la ĉefurbo Lisbono) partoprenis la **28-an Printempan Semajnon Internacian**.

PSI okazis ĉijare (ekde la 2-a ĝis la 9-a de aprilo) en la germana urbo Bonn kun 120 parto-prenantoj. Multaj eventoj okazis dum la aranĝo laŭ la ĝenerala kaj tradicia skemo: laborprogramo matene, ekskursoj posttagmeze kaj distraĵoj/kulturaj eroj vespere. Ni dekomence nin pretigis por ne nur ricevi, sed ankaŭ doni ion. Defrue ni trejniis esperantajntajn kantojn, inkluzive kelkajn tradukitajn el la portugala lingvo, kaj prepariĝis por gvidi atelieron kadre de la laborprogramo. (Pro tio ke la aktivajoj abundis ni rakontu nur pri tiuj en kiuj ni parto-prenis.) Tiel ni elektis ene de la matena laborprogramo parto-prenon en lernateliero ("Mazi"-kurso) kaj manlaboro, kiu konsistis precipe el ŝtofcolorigado kaj vizaĝpentrado; posttagmeze ni parto-prenis en diversaj aktivajoj kiel «sinkaŝado en *Waldau*», vizito al urbo Kolonjo kun eniro en la ĉokoladan muzeon, tuttaga ekskurso al urbo *Königswinter* ĉe la rivero Rejno, vizito al la gastiganta urbo Bonn, kaj piedirado en la tiea parko *Rheinaue*. De la distraĵoj/kulturaj eroj ni elektis unuope laŭvole, kelkajn filmojn (la sagao *Harry Potter* superregis), muzik-koncertojn, kaj konkursojn. Je la lasta

tago dimanĉe iom ŝanĝiĝis la programo, pro tio ke ovo-serĉado kaj popol-danco anstataŭis la lernagadon, kaj la adiaŭa festo kunligis ĉiujn. Ne mankis ankaŭ gimnastikado ĉinstila (*qigōng*) je la sepa kaj duono matene, tuj antaŭ la matenmanĝo, sed malmultaj parto-prenis kaj la geknaboj nur unu tagon aŭdacis tiom frue ellitiĝi.

Mi devas laŭdi la organizintojn pro la kvalito kaj kvanto de la programejoj. Ĉiuj gelernantoj multe profitis el la etoso kaj iom progresis esperante, malgraŭ tio, ke ili preskaŭ ĉiam kune tro ofte krokodilis. Sed oni ne povas postuli nekrokodiladon al komencantoj tiaj, kiaj ili, kiuj nur unufoje semajne kunvenas por lerni esperanton kaj eĉ la plejparto nur ĉijare komencis. Kvantam malmultaj el ili aŭdacis paroli, ili progresis pri komprenado. Ekde la komenca plena dependeco de la instruisto, kiu devis traduki ĉion, ili iĝis iomete memstaraj je la fino. En la estonto eble venos nebridebla deziro aktive partopreni en esperanta movado.


Dum la semajno ĉeestis instruistino el *Herzberg am Harz*, la «Esperanto-Urbo», kune kun tri lernantinoj. Ni ĉiuj bone kunestadis kaj mi al ŝi multe demandis pri la mirinda iniciato starigi oficiale esperanto-urbon. Mi atentigis al ŝi pri mia iama projekto krei reton de per esperanto oficiale ĝemeligitaj urboj (<http://www.ipernity.com/blog/filipe.luizo/112581>), kaj ni facile konsentis pri tio, ke institucioj kiaj E.E.U. devus krei grupon zorgantan pri apogo al ili. ■

(*) Ĉerpita el *Eŭropa Bulteno* 115 (2012.04): 9, redaktita. Detalajn raportojn: <http://www.ipernity.com/blog/filipe.luizo/385983> kaj <http://www.ipernity.com/blog/filipe.luizo/388473>. Foton kovrile.

HOMOJ:

Forpasis Epifânio

Ĵuse per municipa tombejedikto P.E.A. eksciis pri la forpaso de Epifânio dos Santos FERREIRA (nask. 1913; ★1099), okazinta verŝajne en 1999. Li lernis esperanton en 1988 kaj deĵoris sideje kiel vendisto en la Libro-Servo dum la estrado de Werther (1989-1991). Familiaj problemoj malebligis lian pluan movadan laboron. Lia sanstato pliboniĝis en liaj lastaj jaroj, laŭ manskriba firmeco: ja li fidele plukontaktis la asocion. **AMT**



LITERATURO:

Homoj & verkoj

Aperis ĉe U.E.A. 143-paĝa libro *Pri homoj kaj verkoj*, kun la jenaj 11 eseoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj (pĝ.8): *Rolo de la persona faktoro en la Esperanta literaturo: la verkisto* (TÓFALVI ÉVA), *Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn: kelkaj pensoj pri la Esperanto-literaturo, ĝiaj legantoj kaj eldonejoj* (Lena KARPUNINA), *La Vojo* (Carmel MALLIA), *Ĝoje sonu mia kanto: la vivo kaj verkoj de Marie Hankel* (Krys UNGAR), *Kiel legi – ĉu legi – Stellan Engholm?* (Sten JOHANSSON), *La du testamentoj de Sándor Szathmári* (TÓFALVI ÉVA), *La lirika itinero de Miguel Fernández* (GONÇALO NEVES), *Bohemia amoro: Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová* (Sten JOHANSSON), *Arkaika parolado en Esperanto* (Alberto GARCÍA FUMERO), *La kvara periodo en Esperanta literaturo* (Jukka PRITILÄINEN), kaj *Pri la periodoj de la Esperanta literaturo* (Geoffrey SUTTON). **UEA**

MOVADHISTORIO:

Teze pri esperanto

La naŭmonata laboro de sociologo Sónia APOLINÁRIO (NB92:9) atingos signifan ŝtupon la baldaŭan 28-an de septembro, okaze de la prezentiĝo de ŝia magistriĝa diserta (provizora titolo: *Esperanto en Portugalio: 1892-1972. Deveno, stariĝo kaj subpremo de la movado*) en la lisbona universitato ISCTE; publika diskuto sekvos en anoncota dato. Dum ŝia laboro ŝi multe konsultis arĥivan materialon en la sidejo de P.E.A. (kio spronis sidejanojn al fina ordigado de malnovaĵoj!) kaj ĉe aliaj establoj, kaj ŝi intervjuis kelkajn veteranojn — A. S. ALMEIDA, PEDROSA ALVES, Eduardo CRISPIM, LUÍS DUARTE, kaj Artur OLIVEIRA. Ŝi pluos sian esplorlinion (al doktora grado) pri aspektoj de nia landa movadhistorio. **AMT**

HOMOJ:

Mortis la "patro" de nia monumento

Trege malfrue ni eksciis, per poŝtista retrosendo de NB93, pri la forpaso en 2007.11.31 de Artur Rodrigues DAVID — malnova esperantisto, iama municipestranano de Barejro, kaj iama politika prizonano (PIDE 140/27944). Amiko i.a. de José ANTUNES kaj Caeiro de Sousa, li decidige subtenis, kiel skabeno, la asociajn klopodojn nomi la nunan placeton Zamenhof (1983) kaj tien starigi la monumenton pri esperanto (1987; ★G0178, NB93). Kiel pluraj aliaj, li plurfoje aniĝis al P.E.A.: kun numeroj ★0056 (!), ★0727, kaj ★1414 — kiel ĉilasta nur kelkajn monatojn... **AMT**


LITERATURO:

“Fetorafero” laŭrodora por la Hanoja premiado

Dum la ĵusa Universala Kongreso en Vjetnamio malkaŝiĝis i.a. ke honoran mencion (el du) de la branĉo Teatraĵo de la Belartaj Konkursoj de U.E.A. ricevis portugalo José Eduardo da Rosa CRISPIM, veterana esperantisto lisbonia kaj aŭtoro konata per la “plumnomo” Eduardo NOVEMBRO (NB91:31). Lia verkaro publikigis ĝis nun en du volumoj (↓) kaj dise i.a. en *La Karavelo*, *Monato*, *Sennaciulo* — ĉefe originala kaj tradukita prozo, historia fikcio, kaj iom da poezio.

La distingita verko estas “Fetorafero”, dramo inspirita el kurantaj eventoj kaj kontora vivo, laŭ streĉa intrigo dekomence aŭgurita de la rolulnomoj. *Beletra Almanako* fordonis la rajton premiere ĝin eldoni.

Jene altiĝas al tri la nombro da portugalaj laŭreatoj en la Belartaj Konkursoj de U.E.A., aldona al Gonçalo NEVES (entute 11 premioj kaj 5 honoraj mencioj, pro Prozo, Eseo (pĝ.9), kaj Poezio, en 1991-1993, 1995, kaj 1999) kaj João José SANTOS (honora mencio pro Teatraĵo, en 2011; NB91:31). **AMT**



(↙) *Liberaj Tempoj* : Rakonto pri la ĉiutaga laborista vivo *La Karavelo*: Estrezo, 2010. 207×149×8 mm³ 170 g 123 pĝ. ISBN 978-989-96312-2-9 (★08.176; 16,00 €).

(↗) *Etaj Rakontoj* : Portugala Esperanto-Asocio: Lisbono, 1986. 170×120×18 mm³ 140 g 129 pĝ. ISBN 972-9471-04-5 (★08.025; 8,00 €. 1-a eld. 1984, elĉ., reeld. sen ŝanĝoj).



LINGVO-POLITIKO:

Nenia angla ŝtatafere!

La 9-an de majo, dum finanĉministra prezento de leĝpropono pri buĝeto por 2013-2016, mankis statistikaj resumoj pri senlaboreco (aneksaĵoj al la *Dokumento pri Buĝeta Strategio*), kaj laŭdire ili estis jam senditaj al la E.U.-komisiono sed ne al la Parlamento. Jen post insista peto el la opozicio, ili venis — sed anglingve. Voĉigis sian proteston la komunism-partia parlamentano Honorio Novo, kiu rifuzis la disdonatan dokumentaron (*). Ministro Vítor GASPAS ekskuzis sin per tio ke traduko estas farata sed ne ankoraŭ preta. Simile protestis julie, pri britaj finanĉkonsilistoj dungitaj de la registaro, bankestro Fernando ULRICH, el tute alia politika areo (§). Jen pri vanaĵoj al angloj montrotaj... **AMT**

(*) «...este documento vem em inglês. Não aceito, não reconheço, recuso que a Assembleia da República »o« aceite como válido».

(§) «Ter reuniões com o Governo »português« em inglês é incompreensível. Nunca me tinha acontecido tal coisa.»

Fontoj: <http://expresso.sapo.pt/numeros-do-desemprego-ja-foram-entregues-aos-deputados-mas-em-ingles=724634> kaj <http://www.ciberduvidas.pt/aberturas.php?id=1521>

ARANĜOJ:

Agi en Esperanto-insulo

■ Miguel BOEIRO

Ekde la 11a de januaro ĝis la 12a de februaro de 2012 mia edzino kaj mi parto-prenis en grava esperanta eksperimento (*): Ni ĉeestis en Ĉinio (Hajnano Insulo, sude de la lando) kie okazis samtempe kvar esperantaj kursoj en Universitato de Hajkoŭo (*Hāikōu*, ĉefa urbo de la insulo):

Metodika — por perfektigi la lernigajn metodojn de esperantaj instruistoj. Ĉi tiu kurso estis organizita de prof. KOVÁTS Katalin.

«**Alfronti militon**» — pri la komprenado kaj solvado de militaj problemoj en tuta la mondo. Mas-trumis prof. RONALD GLOSSOP.

Filozofio kaj historio de informadiko, instruita de itala prof. FEDERICO GOBBO pri la evoluado de la informadiko ĝis nuntempe.

Intensiva BEK-kurso (nova kaj baza ekzercaro) — Instruis usona prof. DENNIS KEEFE (§). Ĝi estis preparita por komencantoj, ĉefe por junaj ĉinoj.

Parto-prenis entute pli malpli 130 homojn el 32 landoj. Ĉinaj lernantoj estis 63.

Ni parto-prenis en la metodika kurso kaj akompanis kelkajn klasojn pri «Alfronti Militon» kaj informadiko. Tamen la plej parto de la tempo ni helpis la instruadon de BEK-kurso. Ni multe laboris, dum ok horoj ĉiutage, krom dimanĉoj. Neniame povis profiti la anoncitan belan sunon kaj plaĝojn de la fama tropika insulo pro la manko de tempo kaj ankaŭ pro la malbona vetero. Pluvis preskaŭ ĉiujn tagojn.

Kompreneble ni estis lacegaj post la laboro, la hotelo estis iomete malpura, la manĝaĵo estis rizo kaj rizo (matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo) sed ni konsideras ke nia aventuro estis vere utila, frukto-riĉa, kaj agrabla. Tamen ripeti ne eblas pro la altkosta vojaĝo. ■

(*) T.n. “Esperanto-Insulo”, organizata i.a. de ILEI-Ĉinio, Edukado.NET, Lernu.NET, Mondeto, kaj Kosmo; pliajn informojn en <http://esperanto-insulo.info/>.

(§) Dume kaj proe elektita de *La Ondo* kiel «Esperantisto de la Jaro 2011».

MOVADO:

Je la 30-a finverdiĝas Oremo



Jam eĉ tridek monatojn post sia fondiĝo, la unuan de 2010 (NB91:4), Regiona Esperanto-Asocio (*Ourém*) povas fieri pri senmanka publikigado de **monata** bulteno. Ne malpli notinde, legeblas en *La Informa Bulteno de la Regiona Esperanto-Asocio - Ourém 30* (pĝ.6-7↑) ke, ekde la sekva numero, ties enhavo estos tute esperantlingva — kio sendube signalas la maturiĝon de la loka movado, sekve de la kursoj instruitaj de la loka esperantisto Carlos VIEIRA ekde 2009 (*) — malgraŭ lia jama aĝo. Vasta delegitaro el oremaj (mal)novuloj estos do atendata en Palmelo (pĝ.3). **AMT**

(*) En *ibREA-O30.1*, direktoro Aníbal NOBRE plendtone asertas ke la «amplaksaj esperanto-scioj» de C. VIEIRA estis ĝis tiam ne nur ne profitata sed eĉ «ostensivamente ignorados». Demandindas — de kiu.

LINGVO:

La Fundamenta Gramatiko de Esperanto latinene tradukita

A — Litterarum ordo

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz.

N.B. Licet officinis typographicis, quibus signa "ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ" non suppeditant, pro iis "ch, gh, hh, jh, sh, u" uti signis.

B — Normæ

I — Indefinitus non est hac in lingua articulus, cui finitus tantum suppetit ("la"), qui quidem secundum genus, casum numerumque non mutatur.

N.B. Articulus esperanticus æque quam aliorum utendus est sermonum. Cui autem articulo in utendo inferuntur impedimenta, ei licet eum principio omittere.

II — Nomina in litteram "o" exeunt substantiva, quibus littera "j" ad pluralem additur efficiendum, quorum duo tantum sunt casi, scilicet nominativus atque accusativus, qui quidem exito "n" addito e nominativo trahitur, quorum ceteri præpositionibus significantur casi, scilicet: genitivus præpositione "de" dativus "al" ablativusque "per" aut aliis præpositionibus.

III — Nomina in litteram "a" exeunt adiectiva, quorum casi numerique æque quam substantivorum efficiuntur, quorum comparativum adverbio "pli" atque coniunctione "ol" superlativumque adverbio "plej" effinguntur.

IV — Ecce numeralia primaria, quæ quidem declinantia non sunt: "unu, du,

tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil", quorum denaria ac centenaria coniunctione efficiuntur numeralia, e quibusque ordinaria adiectivo addito exito, multiplicativa suffixo "-obl", divisa suffixo "-on", collectiva suffixo "-op", distributiva præpositione "po" trahuntur numeralia, quibus quidem figurazione licet utaris substantiva adverbique.

V — Ecce pronomina personalia: "mi, vi, li, ŝi, ĝi" (quod quidem ad rem bestiamque pertinet), "si, ni, vi, ili, oni", e quibus possessiva adiectivo addito exito trahuntur pronomina, quæ quidem æque quam substantiva declinantur nomina.

VI — Verba secundum personam numerumque non mutantur eademque hisce ostentantur figuris: tempus præsens exitum "-as", tempus perfectum "-is", tempus futurum "-os", modus condicionalis "-us", modus imperativus "-u", modus infinitus "-i" accipit; quorum autem participia sive adiectiva sive adverbia hisce effinguntur suffixis: activum præsens "-ant", activum perfectum "-int", ativum futurum "-ont"; passivum præsens "-at", passivum perfectum "-it" passivumque futurum "-ot". Quorum tamen omnes figurationes passivæ conveniente figura verbi "esti" simul cum participio postulati verbi efficiuntur passivo, quod ad effingendum præpositio "de" utenda est.

VII — Adverbia in litteram "e" exeunt, quorum comparativi gradi æque quam adiectivorum efficiuntur.

VIII — Omnes præpositiones nominativum postulant casum.

IX — Omnium recitatio verborum eorum scribendi rationi plane convenit.

X — Accentus pænultimam in syllabam nunquam non incidit.

XI — Verba simplicium coniunctione verborum, præcipuo in exito dimisso verbo, duplicanda sunt.

XII — Verbum "ne" deponendum est apud aliud negans verbum.

XIII — Verba accusativum accipiunt exitum, ut motus eam in partem significetur.

XIV — Tametsi omnes præpositiones definitam atque constantem habent vim, scito tamen cum e sententia non patet quam utendam esse præpositionem, suppetere præpositionem "je", quæ quidem nullam propriam ostendit vim, ac licere pro præpositione accusativum sine præpositione utaris casum.

XV — Externa verba, quæ quidem pleræque linguarum ex eodem acceperunt fonte, immutabilia in esperanticum transeunt sermonem eademque tamen eius ratione scribendi linguæ efferenda sunt. Scito tamen apud plura verba iisdem e radicibus verbum tantum primarium immutabile in esperantum transeundum esse, e quo cetera esperanticas secundum normas trahenda sunt verba.

XVI — Licet vocalem substantivorum articuli elidas extremam ipsiusque in locum apostrophum supponas.

Scribebam Olisipone, Kalendis Iuliis anno MCMLXXXVII / Lisbonon, la 1-an de Julio 1987
Gonçalo Neves

LERNADO:

Tamen pluinstrui

Miguel BOEIRO senlace plu okupiĝas pri esperanto-instruado, nun ankaŭ en (koincide apudsideja) pensiula kursejo **Unisben** (*Universidade Intergeneracional de Benfica*): El klaso kun 11 lernantoj finis sepo la april-/junian lanĉkurson, kaj dua sesio planatas por oktobro/junio. Kune kun edzino Manuela BOEIRO, li ankaŭ plucertigas pluinstruadon en la **Amikeca Grupo de Alkoŝeto** (*NB91:8*), kie dunivela kursaro ekos la 10-an de oktobro kun ĉ. 7 mezkaj 5 baz-lernantoj. Dume, la **sidejan baznivelan kurson**, neordinare sukcesan (*NB93:10*), trafis aŭguste severa bato pro la neeblo ĉe Nádia PENAS (loĝanta en *Alcácer do Sal* kaj nune senlabora) pluinstrui laŭ ĉiusemajna ritmo. Dum la estraro solvas la aferon, ŝin anstataŭi je la gvido de la dume sepopiĝinta klaso penas estraranoj MARTINS-Tuválkin kaj Wilson BRÍCIDO. Intertempe decidiĝis okazigo de **finekzamenoj** de la niveloj baza kaj meza, sideje la unuan semajnon de decembro — kun sekva diplomigo zamenhoffeste. *AMT+WB*

LITERATURO:

Karavelo aliborde

Transloĝiĝis al Brazilio en 2012 (*NB93:10*) la konata portugala esperantisto João José SANTOS (a.k.k. Ĝoano, Johano), estro de *La Karavelo* kaj de la samnoma eldonejo (*NB91:27*). Jam septembe disendiĝis *LK27*, kun 24 paĝoj da literaturo kaj kulturo: Notindas anonco de baldaŭa libra publikiĝo de *La Mesaĝo* (Fernando PESSOA, trad. João José Santos) nun finaperinta felietone. *AMT*